# *Kubaj kuracistoj laboros en 15 ?tatoj de Meksiko*

*Image not found or type unknown*



**Sesdek kubaj kuracistoj eklaboros en 15 meksikaj regionoj**

Meksikurbo, jul 25 (RHK) La 500 kubaj kuracistoj dungitaj de Meksiko laboros en 15 ?tatoj integritaj al la nova sanplano prizorgita de la Meksika Instituto pri Socia Sekureco (IMSS) kaj Bonfarto, raportis la gazeto  La Jornada.

La ?urnalo informas, ke post Nayarit, kie jam estas 60, aliaj grupoj iros al Colima kaj Tlaxcala, la? la sekretario pri Sano, Jorge Alcocer.

La brigado de profesiuloj ricevis trejnadon pri interna regularo kaj pri la institucioj, kiujn ili subtenos. Ili deklaris, ke ili klopodos anta?enigi kaj helpi la sanservon de meksikanoj.

Krome, diris la oficisto, la ebleco dungi specialistojn el aliaj landoj estas konservita. Li atentigis, ke la celo estas havi la necesan nombron da sanprofesiuloj por plenumi internaciajn rekomendojn.

Taksoj anka? estas faritaj pri la tempo bezonata por la trejnado de homaj rimedoj en Meksiko, surbaze de la plii?o de kuracistaj lo?postenoj,  kiu ?i-jare atingis 20,000. La figuro duobligas la disponeblajn spacojn komence de la nuna administrado.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/294531-kubaj-kuracistoj-laboros-en-15-statoj-de-meksiko

**Radio Habana Cuba**